# Laŭzana Esperanto-Societo

**Marto 2024** **No 3**




**Laŭzana Esperanto-Societo**
p.a. ch. de la Vallombreuse 14
CH – 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com ... esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto : CCP 10-26785-8

**Komitato 2024**
<u>Prezidanto</u> :
Maryse Tissot (079 408 71 76)
<u>Vicprezidanto</u> :
Knud Sunier (079 210 97 75)
<u>Sekretario</u> :
François Randin (076 411 14 55)
<u>Kasisto</u> :
Françoise Pétermann (079 517 44 43)
<u>Redaktoro</u> :
Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

******************

## Marde la 5an de marto je 19h.
## en *Les Marronniers* en Vevey
## Pierre Boizot prezentos la riĉecon de nia biblioteko kaj proponos legendajn librojn facilajn.



Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe: eventaservo.org/o/LES




## La komitatanoj informas:

La venontaj Babiladaj Rondoj okazos ĉe Françoise en La Tour-de-Peilz, la 18an de aprilo kaj ĉe Karlota, en la *Domo de la Boskoj* en Clarens, la 16an de majo.
Cléa kaj Maryse organizos, sabate la 15an de junio, la Ekskurson 2024 en la muzeo *“du Vacherin Mont-d’Or aux Charbonnières”.*



## Babilada Rondo

**ĵaŭde la 14an de marto je 19h.**

ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier,
avenue des Alpes 150, 1820 Montreux
079 210 97 75 * kma.sunier@bluewin.ch



| Espace Dickens, Lausanne<br>**Ma la 2an de aprilo**<br>Legado kaj gramatikaĵo | Les Marronniers, Vevey<br>**Ma la 7an de majo**<br>Knud prelegos ... | * * * Ekskurso 2024 * * *<br>**Sa la 15an de junio**<br>al la muzeo “du Vacherin” |
|---|---|---|

*e*LIBRO

*Antoine de Saint-Exupéry*

# La eta princo



INKO



## Dediĉo de la aŭtoro al Léon Werth

Pardonu infanoj, ke mi dediĉis ĉi tiun libron al "grandulo". Mi havas seriozan senkulpigon: tiu grandulo estas la plej bona amiko, kiun mi havas en la mondo. Mi havas alian senkulpigon: tiu grandulo kapablas ĉion kompreni, eĉ porinfanajn librojn. Mi havas trian senkulpigon: tiu grandulo loĝas en Francio, kie li suferas pro malsato kaj malvarmo. Li ja bezonas konsolon. Se ĉiuj tiuj senkulpigoj ne sufiĉas, mi volonte dediĉos ĉi libron al la infano, kiu iam antaŭe tiu grandulo estis. Ĉiuj granduloj unue estis infanoj. (Sed malmultaj el ili memoras pri tio.) Mi do korektas mian dediĉon:

Al Léon Werth,
*kiam li estis malgranda knabo.*





## I.

Iam, kiam mi estis sesjara, mi vidis belegan bildon en iu libro pri la praarbaro, titolita "*Travivitaj rakontoj*". Tiu bildo prezentis boaon, kiu glutas rabobeston. Jen kopio de la desegno:



En la libro oni diris: "*La boaj glutas sian rabaĵon unuglute, senmaĉe. Sekve ili ne plu povas moviĝi kaj dormas dum sia sesmonata digestado.*"

Ekde tiam mi multe meditis pri la aventuroj en ĝangalo kaj per kolorkrajono mi sukcesis miavice fari mian unuan desegnon. Mian desegnon numero Unu. Jen kiel ĝi estis:



Mi montris mian ĉefverkon al granduloj kaj ilin demandis, ĉu mia desegno timigis ilin.


Ili al mi respondis: "*Kial ĉapelo timigus?*"

Mia desegno ne prezentis ĉapelon. Ĝi prezentis boaon, kiu digestadas elefanton. Do, mi desegnis la enhavon de la boao,





por komprenigi al granduloj. Ili ĉiam bezonas klarigojn. Jen kiel aspektis mia desegno numero Du:



La granduloj konsilis, ke mi flankenlasu desegnojn de boaoj aŭ malfermitaj aŭ ne, kaj prefere interesiĝu pri geografio, historio, kalkularto kaj gramatiko. Kaj tiel, en mia sesjara aĝo, mi rezignis grandiozan pentristan karieron. Mi senkuraĝiĝis pro la fiasko de mia desegno numero Unu kaj de mia desegno numero Du. Neniam la granduloj komprenas tute per si mem kaj al la infanoj estas lacige ĉiam kaj ĉiam donadi al ili klarigojn.

Mi do devis elekti alian metion kaj lernis piloti aviadilojn. Mi flugis iom ĉie tra la mondo. Kaj mi tute konsentas, ke geografio multe utilis al mi. Mi scipovis unuavide distingi Ĉinion de Arizono. Tio estas tre taŭga, se oni vojeraris nokte.

Tiel, dum la daŭro de mia vivo, mi havis amasojn da kontaktoj kun amaso da seriozaj homoj. Mi multe vivis ĉe granduloj. De tre proksime mi vidadis ilin. Kaj tio malmulte plifavorigis mian opinion pri ili.

Kiam mi renkontis inter ili iun, kiu ŝajnis al mi iom klarvida, iam mi provis per mia desegno numero Unu, kiun mi ĉiam konservis. Mi volis scii, ĉu tiu ĉi vere estas komprenema. Sed ĉiam oni respondis al mi: "*Ĝi estas ĉapelo.*" Tiam al tiu mi parolis nek pri boaoj, nek pri praarbaroj, nek pri steloj. Mi adaptiĝis al ties komprenpovo. Mi priparolis briĝon, golfludon, politikon kaj kravatojn. Kaj la grandulo estis ja kontenta koni homon tiel konvenan.